starto

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1971 2

# FRUKTOJ DE LA PORPACA STREBADO

En la pasinta decembro denove silentiĝis la salonegoj en la konstruaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. La diplomatoj, kiuj svarmis ĉe sume 2750 ĉiaspecaj kunsidoj,forlasis la aŭditoriojn,kie fermiĝis la 25-a Ĝenerala Asembleo de UN. Lastjare oni festis la 25an jubileon de tiu ĉi supera instanco de la internacia vivo,kiun digne rememoris ankaŭ Universala Esperanto-Asocio.

Por ĉiuj popoloj de la mondo la antaŭ nelonge finiĝinta UNO-Asembleo havas esencan signifon pro la rezultoj atingitaj ĉe la traktadoj de iliaj reprezentantoj. Ni notu,ke ĉe tiuj ĉi okazoj plurfoje montriĝis daŭre kreskanta influo de la socialisma komunumo je la tutmonda politiko kaj aktiva rolo de sendependaj ŝtatoj de Azio,Afriko kaj Latinameriko.

Kiel speciale grava atingo de la pacamaj tendencoj povas esti konsiderata DEKLARACIO PRI LA FORTIKIGO DE LA INTERNACIA SEKURECO aprobita de ĜA,kiu solene konfirmas ĝeneralan kaj senkondiĉan validecon de la celoj kaj principoj de la UNO-Ĉarto.Ĝi plue rekomendas krei efikan sistemon de kolektiva sekureco sen militoj kaj samtempe kreskigi interregionan kunlaboron.

La Deklaracio alvokas ĉiujn ŝtatojn,precipe la nukleajn grandpotencojn,kiel eble plej baldaŭ haltigi la konkuron en la produktado de armiloj... Ĝi invitas al respektado de la homaj rajtoj kaj kondamnas la koloniismon kaj rasismon en ĉiuj iliaj formoj.

La partoprenintoj de la Ĝenerala Asembleo aprobis ankaŭ deklaracion pri la principoj,kiuj reguligas amikajn rilatojn kaj interŝtatan kunlaboron.

Rimarkindan kontribuaĵon en la porpacaj strebadoj faras Kontrakto pri la malpermeso lokigi nukleajn kaj ceterajn amaseksterMajn armilojn sur la marfundon - subskribita antaŭ kelkaj semajnoj de kelkdekoj da ŝtatoj.

Pozitiva estis ankaŭ diskuto pri la problemo de kemiaj kaj biologiaj armiloj,en kiu aktive partoprenis la ĉeĥoslovaka delegacio.

La ĉefaj rezolucioj de tiu ĉi gravega kunsido montras, ke la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj povos funkcii kiel efika ilo de la paco,se ĝi atentos la bazajn principojn de la Ĉarto kaj ilin konsekvence plenumos.

O.Knichal

## *Ze života kroužků*

KOPŘIVNICE - Od října pokračuje každé úterý 50hodinový kurs pro patnáct účastníků /průměrný věk 24 roků/.

Kroužku se podařilo získat 32 nových členů a docílit tak stoprocentního /!/ zvýšení proti loňskému roku. Je to současně výzva ostatním. Kdo bude další ?

PRAHA - Klub esperantistů se přestěhoval do nové klubovny v restauraci "Zámeček" v Praze 7 Letenské sady /el.zast.u min. vnitra/. Schůze každé úterý, 19 hod. První na novém místě již 16.3. /plenární/. Korespondenční adresa zůstává Praha 1, p. schr.1069.

PŘÍBOR - Kroužek mladých esperantistů při ZDŠ Příbor - sídliště vede od října A.Sattek. Z jeho podnětu bylo v místě utvořeno smyčcové kvarteto "Belsono".

VSETÍN - Knižní služba nakoupila téměř 2000 a prodala 1350 výtisků různých knih v ceně 14 000 Kčs.

V knihovně ve Val.Meziříčí promluvil 15.12.1970 o významu mezinárodního jazyka v současnosti A.Berka /viz obrázek/.



## OSOBNÍ KRONIKA

Ve věku 58 let zemřela 1.února v Brně paní Milada V o n d r o u š k o v á, členka brněnského klubu, na jehož činnosti se aktivně podílela od r.1932 zejména jako členka přípravných výborů sjezdů EA ČSR a ČEA.

Ve stejný den zemřel pan Rudolf N e č a s, člen EK Brno od r.1927 a později jeho několikanásobný místopředseda.

Neočekávaně odešel 20.ledna pan Josef Ch o v a n č í k, člen výboru EK Vsetín. Bylo mu pouhých 42 let.

---

## LA ĈEFDELEGITO KOMUNIKAS:

Pluraj gesamideanoj interesiĝis ĉe mi pri la aliĝo al UEA kiel individuaj membroj en la e r a r a i m a g o, ke la kolektiva membriĝo de ĈEA al UEA ebligas pagi la kotizojn MA ankaŭ per iu fremda valuto.

Dume daŭras provizore nur la permeso, ke mi rajtas akcepti por 1971 la limigitan nombron da kotizoj /90 MA/ en ĉs.kronoj. La kvoto estas preskaŭ plene elĉerpita de niaj jam aniĝintaj MA kaj samtempe delegitoj de UEA. Se unu aŭ du lokoj pojare liberiĝas, atendas jam pli ol dudek interesuloj - aktivaj funkciuloj de nia movado - de la pasinta aŭ antaŭpasinta jaroj.

Do, karaj geamikoj, bonvolu ne postuli plenumon de viaj nerealigeblaj petoj. Se la situacio iel ŝanĝiĝos, mi tion kun plezuro anoncos.

Via František Sviták

---

"SILEZIAJ KANTOJ" DE P. BEZRUČ FINE APERIS EN PRAHA ! LA LIBRO, DUME NUR PRESPRETA, KREDEBLE BALDAŬ ĜOJIGOS ĈIUJN ESPERANTISTOJN-LITERATURAMANTOJN.

## INSTRUISTOJ TRAKTIS EN TŘEBÍČ

Pedagogia sekcio de ĈEA okazigis en Třebíč /12.-14.2.1971/ sian unuan seminarion,kiun ĉeestis 29 membroj kaj 3 gastoj. En la faka parto oni aŭskultis prelegojn de prof. J. Cink /Strukturo de E-a instru-leciono/,D.Kočvara /Instruado en naturo/,L.Křivánek /Spertoj pri uzo de Auld-lernolibro en kursoj por progresintoj/kaj K.Kraft /Instruado al infanoj/, kiujn sekvis vigla diskuto.

Detale estis diskutita problemaro de SET kun speciala atento al ĝia baza instru-plano. Estis proponita internacia interŝanĝo de tendaraj instruistoj por forigi daŭran mankon de nialandaj SET-instruistoj. La kunsido aŭskultis raporton de la Ekzamena Komisiono /inĝ. L. Krajíc,J.Chvosta/ pri la unuaj ekzamenoj pri kapableco instrui Esperanton /printempon 1971/, aprobis ĝian financan planon kaj komisiis ĝian prezidanton ellabori Demandarojn el ĉiuj ekzamenotaj fakoj.

D-ro Hradil estis komisiita zorgi - kunlabore kun aliaj kompetentuloj - pri kompilado de oficiala koresponda kurso de ĈEA. La kunsido elektis reprezentanton de Internacia Pedagogia Revuo por ĉeĥaj landoj/s-anon Koštál/,redaktan komitaton por IPR /inĝ.V.Kočvara,Z.Hršel, d-ro Novobilský/ kaj du fakturrevizorojn /s-anoj Roubínek kaj Koštál/. La ĉeestantoj aprobis raportojn de la sekciaj prezidanto kaj kasisto.

Dum la vesperaj horoj okazis unuafojaj prezentoj de magnetofonaj programoj "J.A.Komenio"kaj "Poeto Jiří Kořínek". /La programojn kopias s-ano F.Průcha,Leninova 18,Ústí n.L.,al kiu oni sendu magnetofonan bendon kaj 20 Kčs./ Krome L.Křivánek prezentis diapozitivojn el Jugoslavio /Primošten/,s-ano Jičínský diapozitivojn el SET,s-anino Matyková deklamis du poemojn kaj per sonbenda registraĵo de voĉo de J.Šupichová kompletigis rememor-paroladon pri tiu ĉi nia pionirino. /van/

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO aperados ekde tiu ĉi jaro regule /3 kajeroj jare po 30 paĝoj,interesa enhavo,presita/.Abonprezo 30 Kčs.Peranto por ĉeĥaj landoj s-ano Koštál,Teplice v Č.,Libušina 2350,de kiu petu pliajn informojn.

Esperantistoj-pedagogoj,neprе abonu tiun ĉi fakan revuon !

---

## BONA NEGOCO POR VI !

Kiam mi antaŭ kelkaj jaroj ĉeestis la Universalan Kongreson de UEA en Budapeŝto,mi estis tre surprizita,ke eĉ en tiu ĉi lando estis eble pagi kotizojn al UEA aŭ fariĝi dumviva membro. Tiam mi tre bedaŭris, ne havinte sufiĉe da mono por pagi la koncernan sumon. Tamen en la pasintaj jaroj mi fariĝis dumviva membro de UEA kaj nun mi tute ne bezonas zorgi, kiamaniere pagi kotizojn, ĉar mi ĉiumonate ricevadas la Revuon kaj ĉiujare Jarlibron.

Laŭ onidiro,en 1972 okazos Eŭropa konferenco de UEA en la hungara urbo Gyula.Certe ankaŭ tie oni povos pagi kotizojn. Mi tre rekomendas tion al vi ĉiuj, kiuj volus helpi al UEA. Se vi fariĝos DM de UEA,vi perdos nenion kaj gajnos multon.

V.Sládeček,dumviva membro de UEA

HELPU AL AVIGNON ! Por demonstri la efikan rolon de Esperanto oni petas sendi la plej bonajn desegnaĵojn por la preparata ekspozicio "Infanoj de la tuta mondo" al s-ino S.Humm, Chemin des Neuf Peyres,84 - Avignon, Francio. La ekspozicio okazos en julio-aŭgusto.

# Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en Vsetín 24. 9. - 27. 9. 1971

PROVIZORA PROGRAMO :

| | |
|---|---|
| Vendredo | 24.9.1971.Konatiĝa vespero en Kulturdomo SKLÁŘ,Vsetín, Ohrada.19-a horo. |
| Sabato | 25.9.1971. Inaŭguro de la renkontiĝo.Ĉeĥo-slovaka reciprokeco,program-prelegoj de la slovaka kaj ĉeĥa reprezentantoj. Diskuto. 9-a - 12-a horo. Oratora kaj recita konkursoj. 14a - 16a horo. Junularaj prezentoj 16a-18a horo. Solena vespero. Unua parto esperantista, dua parto folklora. Kulturdomo SKLÁŘ. |
| Dimanĉo | 26.9.1971. Kunsido de sekcioj de ambaŭ asocioj. 9a-12a horo,Kulturdomo SKLÁŘ kaj Lidový dům. Renkontiĝo kun estraranoj de ambaŭ Esperanto-asocioj. Diskuto.Disdonado de premioj. Fermo. 14a - 18a horo.Esperanto-filmoj 19a horo - Kulturdomo SKLÁŘ. Libera vespero. |
| Lundo | 27.9.1971. Tuttaga ekskurso : Vsetín-V.Karlovice-Soláň -Rožnov p.R.-Pustevny/Radhošť-Frenštát-Hodslavice-Val. Meziříčí-Vsetín.Forveturo de la kulturdomo SKLÁŘ, 7,30 horo. |

ĜENERALAJ INFORMOJ:

| | |
|---|---|
| Kotizo | Kčs 30.- ,junularo 20.- rajtigas partopreni ĉiujn aranĝojn. |
| Loĝado | en hoteloj Besední dům kaj Bezkyd,ambaŭ C-kategorio;turisma tranoktejo Pančava kaj Sokolovna.Ĉambroj 2-4 litaj. |
| Antaŭpagoj | necesaj ĝis 15.8.1971. |
| Ekskurso | 35 Kčs inkluzive de enirpago,antaŭpagota ĝis 15.9.1971. |

La celo de la renkontiĝo estas pliprofundigi fratajn rilatojn inter la anoj de ambaŭ nacioj,doni eblecon interŝanĝi spertojn de la poresperanta laboro kaj konatiĝi reciproke pri la agadprogramoj de ambaŭ asocioj.Ĉiu EK estas petata sendi kelkajn reprezentantojn.

Gvidantoj de la unuopaj sekcioj anoncu antaŭ 1.8.,ĉu vi intencas aranĝi laborkunsidon kaj indiku proksimuman nombron de la partoprenantoj.

La estraroj de ambaŭ asocioj estas petataj nomi po 3 fakulojn en konkursan juĝistaron kaj fiksi devigan temon por la oratora konkurso.

Okaze de la renkontiĝo EK Vsetín intencas eldoni inform-libreton pri la regiono Valaĥio.Krom ĝeneralaj priturismaj informoj oni volonte envi igus ankaŭ historion de la E-movado.Tial estas urĝe petata ĉiu esperantisto,kiu povas helpi,sendi al EK ĉu informon aŭ bildon,fotografaĵon - aŭ atentigon pri la alia helpema persono. En la menciita libreto /20paĝa/ oni volonte envicigus ankaŭ pagitajn reklamojn de naciaj entreprenoj.

Nur per ĉies kunlaboro la renkontiĝo fariĝos inda festo de la ĉs.esperantistoj.Skribu al ni tuj!

ER de KP Vsetín,Lidový dům,koresp.adreso A.Berka,Vsetín 1423.

Na aktuální téma

## Kolik je „mrtvých“ duší?

Z těch okrouhle osmdesáti klubů roztroušených po Čechách a Moravě se v našem časopise objevuje tak jedna třetina. Některé se nechávají slyšet jednou či dvakrát za rok, o některých nemáme téměř zprávičky.

A přece si nemůžeme utvořit obraz o jejich činnosti jen podle tohoto měřítka. Ne v každém případě jde totiž jen o nedostatek informací.

Jsou kroužky, které počtem svých členů převyšují několikanásobně celkový průměr a aritmeticky doslova "drží" svazovou základnu. Jenom, na rozdíl od jiných i početně slabších skupin, projevují jaksi menší aktivitu, či zaměřují ji nesprávným směrem. Jsou mezi nimi i ty, o nichž jsme se za celý rok sotva dočetli.

Důkazem toho, že příležitostí k účinné práci prostřednictvím mezinárodního jazyka je všude dost, může být například loňská iniciativa z Boru u Tachova. O činnosti kroužku jsme psali v prvním letošním čísle. Zaslouží však, aby se o ní psalo ještě více v novinách a hovořilo nejen v místních politických orgánech, ale dokonce /!/ i ve schůzích našich kroužků. Vždyť je také o čem.

Tím se nikterak nechci dotknout cti a výsledků cílevědomé práce dalších - v Opavě, Ostravě, Gottwaldově, Vsetíně, Ústí n.L., Č. Třebové a jinde - které si mohou dát znamení průkopníků esperantské osvěty směle do svého štítu. Jejich akce jen získávají hnutí mezinárodního jazyka prestiž a vážnost, a našemu svazu nové uvědomělé členy.

Tito esperantisté netlumočí neustále staré pravdy, ale vytvářejí mezinárodním jazykem nové hodnoty. Nelpí na organizačních problémech, nýbrž se věnují společensky prospěšné práci. Jsou spolehlivou školou pro zájemce o mezinárodní jazyk.

Agitujeme-li dnes za co nejmasovější základnu Českého esperantského svazu, neznamená to ještě, že chceme dosáhnout co nejvíce - "mrtvých" duší !

/knl/

---

Opravte si v adresáři !

Do nového seznamu kroužků rozesílaného sekretariátem svazu koncem loňského roku, si připište případně pozměnte :

EK při SZK Bučovice, okr. Vyškov /MUDr. V. Nekuda, Nová 778/.
Škrtněte : EK Litoměřice.
Do své evidence zaznamenejte adresy těchto kroužků : EK ZK ROH Nářadí, Česká Lípa /R. Niederlová, Vrchlického 837, Č. Lípa; EK ZK TATRA Kopřivnice /H. Nováková, Kopřivnice 358, okr. N. Jičín/; EK AMIKECO, pošt. přihr. 77, Sokolov I ; EK při SZK, Školní 4, Vyškov.




Více než dvěstě esperantistů z devíti měst se sešlo 23. ledna na 2. esperantském bálu v České Třebové.
foto M. Voleská

## Verda agentejo raportas

OSLO - Apud la federacia kanceliero de FRG,Willi Brandt,ankaŭ UEA estis ĵus kandidatigita por la Pacpremio Nobel.Inter la proponintoj elstaras grupo de 132 membroj de la Sveda parlamento,konsistanta el membroj de ĉiuj svedaj politikaj partioj.

BRATISLAVA - Internacia Studenta Unio,kies 10a jubilea kongreso okazis antaŭnelonge en la slovaka ĉefurbo,invitis ankaŭ reprezentanton de TEJO. Kvankam la sidejo de TEJO komisiis sian delegiton en Ĉeĥoslovakio partopreni la kunsidojn,la delegita loko restis - malplena. • La Slovaka televido preparas kurson de Esperanto kun helpo de AE SSR.

VARSOVIO - La II-an Internacian Kongreson de Polliteraturaj Tradukistoj okazintan pasintoktobre partoprenis ankaŭ kvar tradukistoj en Esperanton.

TALLIN - Ekde januaro 1971 funkcias ĉe la Domo de Talinaj Klerigaj Scienclaboruloj sekcio de pedagogoj-esperantistoj.La sekcio gvidas kaj organizas la laboron de ĉiuj E-instruistoj en Soveta Estonio.

LONDONO - "Neŭtraleco de UEA - ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata ?" - estas la temo de tre popularа programero de la 56-a Universala Kongreso.

STOKHOLMO - Agadgrupo por Esperanto en Göteborg alvokas ĉiujn samideanojn skribi leteron aŭ poŝtkarton al Radio de Svedio,eksterlanda programo,S-105 10,Stockholm,petante programon en la internacia lingvo Esperanto. Oni konstatis,ke en tiu ĉi kampanjo la plej rimarkindan kontribuon alportis ĝis nun la ĉeĥaj esperantistoj.

TORINO - Andrzej Tomecki,la konata pola esperantisto,kiu dum sia mondvojaĝo prezentas sian spektaklon "Kaj tamen estas Varsovio", nuntempe aktoras en Italio.

---

## INVITO AL FERIOJ

ESPERANTA RIPOZO INTER AMIKOJ. Kiel sciigis al ni Bulgara Esperanto Asocio,sub tiu ĉi nomo organizas ripozon por esperantistoj la ŝtata komerca entreprenejo "Balkanturist". Ĝi okazos en la pitoreska turista objekto "Barikadite-Esperanto".La regiono situas en la mezo de Sredna Gora,ĉirkaŭ 1500 m super la marnivelo.

La restado daŭros entute 12 tagojn,el tio du en Sofio.Prezoj inter 90-120 levoj aŭ 45-60 US dolaroj.Pri detaloj bv.vin turni al Balkanturist,bulv.Dondukov 2,Sofio,tel.88-41-77 aŭ 87-44-81.

LA ORA POLA AŬTUNO. En la montara ripozloko Miedzygórze okazos de la 17a ĝis la 30a de septembro 1971 jam la VII-a internacia esperantista ferio. Organizas ĝin Feria Fako de Polaj Sindikatoj kaj la Vroclava Filio de Pola Esperanto-Asocio.Al ĉiuj aliĝintoj oni sendas invitilojn por faciligi ricevon de pasporto aŭ pola vizo. Detalaj sciigoj ĉe : Pola E-Asocio,Wroclaw 17,p.k.16, str. Dubois 3.

Prospektojn kaj informojn pri Miedzygórze,Malsupra Silezio,Wroclaw kaj Pollando petu esperantlingve de : Dolnośląski Ośrodek Informacji Turystycznej,Wroclaw,str.Kollataja 31.

LA 4-a INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA /IREN/ okazos en Abaliget, Hungario, de la 17a ĝis la 27a de julio 1971. Informojn donas : Organiza komitato de IREN, leteradreso Pécs 1, pf. 2, Hungario.

# Recenzoj

William A u l d : PAŜOJ AL PLENA POSEDO. Progresiga legolibro de Esperanto kun lingvaj ekzercoj. Eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Heroldo de Esperanto en 1970; 239 paĝoj. Prezo 2 US dol. aŭ egalvaloro. Kovrilpaĝon desegnis B. Jaranowska.

"Tiu ĉi libro estas planita tiel, ke ĉiun "paŝon" la studanto komencu per legado de la legaĵo. Finkomprenínte la legaĵon, li povas fari la lingvajn ekzercojn de tiu "paŝo".

En la komenco mi supozas ĉe la studanto posedon de la gramatiko kaj elementan vortprovizon de ĉ. 700 vortoj. En tiu ĉi libro estas klarigataj 1682 vortoj ; kun la elementa vortaro, do, la studanto en la fino devus disponi pri ĉ. 2400 radikoj. La tekstoj estas aranĝitaj p r o g r e s i g e, kaj ilia malfacileco estas ĝenerale gramatika aŭ stilistika.

La libro celas kaj kursojn kaj memlernantojn. Kursgvidantoj scios utiligi la donitan ekzercmaterialon laŭ sia bontrovo. La devizo de la libro estas : Esperanton oni plej bone lernas per studado de bona Esperanto. Laŭeble evitu la nacian lingvon ; komprenu en Esperanto, kaj vi pensos en Esperanto !"

/El la antaŭklarigo de la aŭtoro./

JAVISKO, monata revuo por slovakaj amatoraj teatristoj, deklamistoj, pupteatristoj kaj praktikantoj de malgrandaj scenejaj formoj ; eldonas la slovaka kulturministerio.

En la unua ĉijara numero oni trovas regulan Esperanto-paĝon redaktatan de E.V. Tvarožek, sur kiu sin prezentas tri ĉeĥaj poetoj /P. Bezruč, S. Čech kaj K.H. Borovský/ en la traduko de S. Schulhof.

La gazeto alportas krome raporton pri la pasintjara III-a Pupteatra Internacia Festivalo en Zagreb /5.-11.10.1970/, kie la pupteatristoj el Košice - venkintoj de la sama festivalo de antaŭ du jaroj - gajnis la 2-an premion kun la ludo de J. V. Pleva "Budulinĉjo" esperantigita de inĝ. M. Zvara.

---

SOVETA ESTONIO. Belaspekta kaj plaĉa prospekto kun kolorаj fotografaĵoj eldonita en Tallin 1970.

Sur kvardek paĝoj la leganto povos trovi bazajn i n f o r m o j n pri geografio, historio, ekonomio kaj kulturo de tiu ĉi apudbalta respubliko.

---

STATISTIKO PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN LERNEJOJ en la j. 1968/69 /Centro de Esploro kaj Dokumentado, eldono angla-Esperanta/ montras, ke - kompare kun tiu pri 1965/66 - la ĝenerala situacio restis simila kun Britio, Bulgario, Francio, Italio, Hungario, Jugoslavio, Nov-Zelando kaj Pollando kiel la gvidaj landoj sur tiu kampo. Minimume 543 lernejoj instruis al 16 505 lernantoj kontraŭ 427 kaj 16302 en 1965/66.

La statistiko ankaŭ montras, ke el 31 landoj nuraj kvar /Bulgario, Hungario, Pollando kaj Jugoslavio/ konkeris duonon de tiu ĉi sumo kun 262 lernejoj kaj 8 602 lernantoj.

# Korespondi déziras

SOVETIO - Anja VOJNAROVIČ, instruistino, serĉas plumamikojn por si kaj siaj gelernantoj 10-18 j. Adr.: Avdejevka-3, d.9, kv.37, Doneckaja obl., Ukraina SSR.

GDR - Werner PFENNIG /vd.la foton/, 27jara oficisto, interŝanĝas esperantaĵojn kaj lumbildojn, DDR - 214 - Anklam, Demminerstr.80.



JAPANIO - Tomoko KIKUČI, 2-16-8, Kamata, Ota-ku, Tokio. Kun samideanoj el Ĉeĥoslovakio/lernas la ĉeĥan lingvon/.

USONO - Paul J.LAREAU, 29jara librotenisto, kun samfakuloj el la tuta mondo. Aliaj interesoj: genealogio, pacmovado kaj internaciaj aferoj. Adr. 1032 Orchard Street Toledo, Ohio 43609, USA.---

La redakcio akceptas senpage korespondanoncojn el ĉiuj landoj. Oni indiku aĝon, sekson, profesion kaj interesojn. Skribu legeble vian adreson !

---

Okaze de la INTERNACIA VIRINA TAGO amike salutas ĉeĥajn esperantistinojn, dezirante al ili feliĉan pacan vivon, sanon, prosperon kaj sukcesojn en la nobla agado por socialismo kaj interpopola amikeco, Leningrada Esperanto-Klubo kaj en la nomo de la Esperanto-Komisiono de Uzbeka Amikeca Asocio Petro Poliŝĉuk el Taŝkento.

Bukureŝta ESPERANTO RONDO deziras al Ĉeĥa Esperanto- Asocio feliĉan kaj prosperan novan jaron kaj dankas pro la senditaj numeroj de STARTO 1970.

---

Bulgaraj Esperantaj poŝtmarkoj /"30-a jubilea kongreso de Esperanto 1947"/po 2 Kčs kaj la poemaro de C.Murgin "Kantoj por la paco", broŝurita, 40 pĝ., formato 12x8 cm po 6 Kčs aĉeteblaj ĉe L.Cibur, Výčapy 54, p.Vrdy, okr. Kutná Hora, ČSR.

---

Posluchačům na "zelených" vlnách : nezapomeňte si přeladit na VKV Bratislava, kde třikrát týdně uslyšíte pravidelnou esperantskou hlídku - v pondělí a pátek od 10,45 do 11,00, v sobotu od 8,30 do 8,45 hod.

## V ZRCADLE TISKU

Esperanto v Bučovicích, "Náš život", Vyškov 2.10.1970 • Kurs esperanta v Šumperku, "Naše slovo" Šumperk, 21.10.70 • Ke dvěma výročím přerovských komeniologů /F.Hýbl o J.Krumholcovi/, "Nové Přerovsko" 30.10.70 • Příklad hodný následování /dopis D. Horáčkové k rozhovoru s esperantistkou pí Kaplanovou v rozhlasovém pořadu ...A léta běží, vážení/, "Beseda" Praha 6.11.70 • Esperanto propaguje /D.Kočvara/, "Jiskra", týdeník Vítkovic 3.12. 70 • Latina proletariátu, "Ostravský večerník" 8.12.70 • Po Japonsku za zelenou hviezdou /O. Knichal/, Nedeľa Bratislava, č. 22 1970 • Aktivní esperantisté /O. Klíma/, Mladá fronta Praha 13.2. 1971.

---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český esperantský svaz, Praha 2, p.k.8. Aperas dufoje kvaronjare - vychází dvakrát čtvrtletně. Redakta komitato-redakční rada : ing. Eduard Felix, Jaroslav Mařík, ing. František Sviták. Respondeca redaktoro-odpovědný redaktor Oldřich Knichal.